

Kiam Zamenhof perdis sian bastonon Implicitaj premisoj en planlingvo

Resumo

Malofte eblas studi la konstruadon mem de planlingvoj. Zamenhof permesas kelkajn rigardojn en sian laboratorion, ekzemple kiam li klarigas la morfemkombinan vortfaradon de Esperanto kaj montras kiel interpreti la kompleksajn vortojn sen antaŭa scio de la lingvo. La artikolo studas la aglutinan vortfaradon, la partipojn kaj la gramatikan karakteron en Esperanto kaj trovas en ili premisojn implicate faritajn de Zamenhof. Ĝi konkludas, ke per tiaj premisoj la aŭtoro donis al sia lingvo direktitan evoluivon.

1 Observi la planadon

Humphrey Tonkin ludas gravan rolon inter la sciencaj analizantoj de planlingvoj. Li posedas fajnman lingvistikan sentemon kaj apud sia tre aktiva kaj energia movada agado por Esperanto li ankaŭ kapablas rigardi nian lingvon per la okuloj de scienca observanto, konstati kaj aprezi ĝiajn ecojn kaj ĝian funkciadon kompare al aliaj planlingvoj kaj analizi la specifecon de la planlingvoj inter la lingvoj de la homaro. Se altranga sciencisto ripete elstarigas ĝuste unu citaĵon de la aŭtoro de Esperanto, li devas trovi en ĝi ion esence interesan. En ĉi tiu artikolo mi klopodas spuri tiun esencon.

La teksto, kiun Tonkin en sia verkaro enfokusigas plurfoje (ekz. Tonkin 2001a: 23, 2001b: 310), estas la jena alineo el la antaŭparolo de la Unua Libro, kie Zamenhof klarigas la koncepton, kiun li nomas “vorto”:

Mi aranĝis plenan *dismembrigon* de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el *senŝanĝaj* vortoj. Se vi prenos verkon, skribitan en mia lingvo, vi trovos, ke tie ĉiu vorto sin trovas *ĉiam* kaj *sole* en unu konstanta formo, nome en tiu formo, en kiu ĝi estas presita en la vortaro. Kaj la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj k.t.p. estas esprimataj per la kunigo de senŝanĝaj vortoj. Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la Eŭropaj popoloj kaj al kutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alkonformigis tiun ĉi dismembriĝon de la lingvo al la spirito de la lingvoj Eŭropaj, tiel ke se iu lernas mian lingvon laŭ lernolibro, ne tra leginte antaŭe la antaŭparolon (kiu por la lernanto estas tute senbezona), – li eĉ ne supozos, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia patra lingvo. (Zamenhof 1887, citita laŭ Zamenhof 1903/1992: 234)¹

Mi demandis min, kial Tonkin el la ampleksa verkaro de Zamenhof levas ĝuste ĉi tiun mallongan teksteton. Laŭ mia supozo la respondo troviĝas en la jena rezono: Lingvistoj studas lingvojn, interlingvistoj studas planlingvojn. Sed ekzakte kiujn fenomenojn en tiuj lingvoj ni studas? Laŭ la klasika strukturisma teorio de Ferdinand de Saussure (1916/1969: 31) la studobjektoj de la ĝenerala lingvistiko estas la sistemo kaj la uzo de la lingvo, kiujn li france nomis *langue* kaj *parole*. Historiaj lingvistoj studas ankaŭ la evoluon de la sistemo kaj de la uzo. Sed en planlingvoj la faktoj estas iom aliaj. Ni konas naŭcenton aŭ milon da planlingvoj (Duliĉenko 1990). Blanke (1985: 107-108 kaj tabelo 2) klasifas ilin laŭ la grado de ilia komunika realigo, alivorte laŭ la uzo. La apenaŭ uzatajn Blanke nomas

¹ La Unua Libro (Zamenhof 1887) aperis en la rusa kaj aliaj etnaj lingvoj. En ĉi tiu artikolo mi ĉie citas la Unuan Libron laŭ la esperantlingva traduko presita en la *Fundamenta Krestomatio* (Zamenhof 1903/1992).

planlingvoprojektoj, la duonvoje progresintajn semiplanlingvoj kaj la ĝis nun solan, kiu trairis la tutan vojon al kompleta uzo, Esperanton, li nomas planlingvo.

Nur en la semiplanlingvoj kaj en Esperanto ni povas studi iom da historia evoluo, sed evidente tre multe malpli longan historion ol en etnaj lingvoj. Sed kompanse al tiu plejparta manko de historio ekzistas alia, tre rivela studobjekto: la planado. Do la procezo de la laŭplana konstruado de la lingvosistemo, la elprovado de malnetaj sistemoj kaj sistemeroj, la revizio de pli fruaj versioj de la plano. Tio estas por la lingvistiko treege interesa kaj inter la lingvoj de la homaro unika eco de la planlingvoj². Tamen, ĉar la planado kaj konstruado de la planlingvoj plej ofte okazis en la studĉambroj de unuopuloj kaj ĉar ni ne ĉeestis en tiuj ĉambroj, ni fakte povas studi tiun esence informan objekton nur tiom, kiom ĝi estas dokumentita. En la kazo de Esperanto, ni havas iomete da nereakta dokumentaĵo, nome la praesperantaj skizoj kaj tekstojn. Ili ne permesas observi la konstruadon mem, sed ili estas almenaŭ dumvojaj stadioj de ĝia produkto, tiel ke ni almenaŭ povas konjekti pri la planado.

Plian eblon analizi la konstruadon ni havas en la raraj dokumentoj, en kiuj la aŭtoro de Esperanto eksplicite diras al ni, kion li pensis, kion li celis kaj kial li faris ĝuste ĉi tiel. La supra citaĵo pri la cerbumoj, kiuj kondukis al la ideo de la morfemkombina strukturo, estas unu tia valora konfeso.

La citaĵo el la Unua Libro, pri kiu Tonkin nin atentigas, portas en si multon interesan. Mi ŝatus tezi, ke en ĝi ni povas vidi iom de la implicitaj premisoj, sur kiuj Zamenhof bazas la konstruon de Esperanto. En ĉi tiu artikolo mi ŝatus klarigi la nocion de implicita premo kaj studi ĝin en tri objektoj. Tiuj estas la citita morfemkombina strukturo de la Esperantaj vortoj, la dek ses reguloj kaj la gramatika karaktero de la radikoj en Esperanto. Ĉiuj tri tre proksime interrilatas.

2 Serĉi la bastonon

Kiel unuan el la tri studobjektoj ni do pli detale rigardu la alineon de Zamenhof pri la koncepto “vorto”. Kontraste al Tonkin, ekzemple Dietterle ne trovas ĝin grava. En *Originala Verkaro* li citas longan parton el la antaŭparolo de la Unua Libro, sed ellasas ĝuste ĉi tiun tekston, piednotante “Nun Zamenhof donas ekzemplojn [...]” (Zamenhof 1929: 21 n. 1). Zamenhof mem en *Fundamenta Krestomatio* ja represas ĝin (Zamenhof 1903/1992: 235) kaj ĝi ankaŭ ne eskapis la kompletemon de Ludovikito (Zamenhof 1973: 16).

La koncepto “vorto”, tia kia Zamenhof klarigas ĝin en la Unua Libro, nek estas tio, kion la ĝenerala lingvo nomas *vorto*, nek kongruas kun la lingvistika termino *vorto*. Ni kutimas traduki tiun zamenhofan deklaron en la lingvaĵon de la nuntempa lingvistiko dirante, ke Esperanto havas senŝanĝajn *morfemojn* kaj per tio posedas la eksteran aspekton de fleksia lingvo, tiel similante al inter aliaj la latinidaj lingvoj, el kiuj devenas la plejparto de ĝia morfemaro, sed ke fakte ĝia strukturo estas aglutina (kiel la finna, la turka, la hungara kaj aliaj lingvoj). Ni ankaŭ scias, ke la senŝanĝeco de la morfemoj en Esperanto ne estas centprocenta, ĉar la karessufiksoj *-ĉj-* kaj *-nj-* tranĉas kaj do ja ŝanĝas la ĉefmorfemon de la koncerna vorto. Sed ni esploru la esencon de tiu zamenhofa ideo.

² La planiteco estas difina eco de planlingvoj. Tamen notindas, ke planlingvoj ne estas la solaj lingvoj kies sistemo kaj uzo dependas de planado. Ankaŭ multaj etnaj lingvoj pasis periodojn de pli aŭ malpli forta intenca influado en la formo de lingvoplanado. Unu el ĝiaj ĉefaj teoriuloj, Tauli, ne vidas esencan diferencon inter la du, sed konsideras la konstruadon de planlingvoj speco de lingvoplanado (Tauli 1968: 167-170). Krome, en la hodiaŭa faka komunikado oni konstruas reguligitajn lingvojn. La baza materialo de reguligita lingvo estas la sistemo de unusola etna lingvo, kiun oni reduktas per malpermeso de certaj vortoj kaj sintaksaj konstruoj kaj preskribo de anstataŭaj formoj (Schubert 2001, 2008).

Per tio, ke li igas sian lingvon ŝajni kutima, Zamenhof faras ĝin akceptebla por sia celgrupo, la edukitaj eŭropanoj de la 19-a jarcento. Per tio, ke li igas Esperanton fakte tute alispeca, Zamenhof havigas al la lingvo tiun grandan facilecon, kiun li notis kiel la unuan el la tri “plej ĉefaj problemoj” (Zamenhof 1887, citita laŭ 1903/1992: 231) de novlanĉita planlingvo.

Tonkin (2001: 23) klarigas al ni, ke la bone kaŝita revolucieco de la konstruopiano por la zamenhofa lingvo en la komenca periodo restis grandparte nerimarkita, tiel ke la fruaj esperantistoj ĝuis la latinidan ŝajnon kaj eĉ ne rimarkis, ke ili utiligas la aglutinan veron. Tio estas natura sinteno: Per nova ilo oni komence klopodas fari la samon, kion oni faris per la malnova ilo, do oni uzas Esperanton komence kiel eble plej simile al la denaska kaj la lernitaj lingvoj. Nur iom post iom la fruaj uzantoj de la lingvo kuraĝis, ekzemple, uzi la senperan verbigon kaj aliajn vortfarajn neortodoksaĵojn, kiuj, kiam ja ekuzitaj, malsimiligis Esperanton de ĝiaj latinidaj, kaj ĝenerale de ĝiaj hindeŭropaj modeloj.

Ni sekvu la ideon de facileco. Lingvo estas komunikilo kaj en komunikado partoprenas almenaŭ du (kaj evidente ofte pli da) personoj. La minimumaj du komunikantoj estas la parolanto/verkanto kaj la aŭskultanto/leganto. Zamenhof klarigas al ni, ke dank’ al (interalie) la morfemkombinado la lingvo estas facile lernebla. Lerni signifas lerni paroli/verki kaj lerni aŭskulti/legi. Ni vidu, kiel funkcias la morfemkombina sistemo por la sendantaj kaj por la ricevantaj komunikantoj.

Antaŭ ol pluanalizi tiun demandon, ni rapide deflankiĝu por memori, ke ekzistas aliaj planlingvoj, kies aŭtoroj solvis la planadajn taskojn alimaniere ol Zamenhof. Occidental de von Wahl (Blanke 1985: 161-167, Duliĉenko 1990: 219-220) kaj Interlingua de Gode (Gode/Blair 1951/1971) estas ekzemploj de planlingvoj (semiplanlingvoj laŭ Blanke), kies aŭtoroj strebis al multe pli granda simileco al la latinidaj lingvoj ol ĝin celis Esperanto. Samkiel Esperanto ĉi-ambaŭ lingvoj estas aposterioraj planlingvoj, do sistemoj kiuj pruntas siajn elementojn el etnaj lingvoj. Ene de la grupo de aposterioraj planlingvoj, Esperanto estas skemisma lingvo kiu pruntas morfemojn (Kolker 1984: 1), dum Occidental kaj Interlingua estas naturismaj lingvoj kiuj pruntas vortojn. La ideo de strikte regula morfemkombinado en ili mankas. Sekve, la naturismaj planlingvoj ne havas regulan transiron de verbo al samradikaj adjektivo, adverbo, substantivo kaj simile, sed prenas el siaj etnolingvaj fontoj ĉiun el tiuj vortoj aparte, eble kun refleksoj de etnolingva kunmeto aŭ derivado el iu historia epoko kaj eble kun du malsamaj radikoj por du el la similsignifaj vortoj. La vortoj de naturismaj lingvoj estas pli “naturaj”, do pli facile rekoneblaj por regantoj de la fontolingvoj, sed malpli facile konstrueblaj por parolantoj/verkantoj. Naturismaj lingvoj do faciligas pasivan uzon, skemismaj aktivan.

Kiel skemisma planlingvo Esperanto pruntas nur unu morfemon kaj plukonstruas vortojn el ĝi laŭ siaj propraj reguloj. Sed ĉu, faciligante la aktivan uzon, Esperanto eble malfaciligas la pasivan komprenon? Ni legu, kion Zamenhof diras pri kompreno. Iom poste en la sama antaŭparolo al la Unua Libro li klarigas al ni, kiel funkcias la kompreno de la kunmetitaj Esperantaj vortoj.

Mi troviĝis en Rusujo, ne sciante eĉ unu vorton rusan; mi bezonas turni min al iu, kaj mi skribas al li sur papereto en libera lingvo internacia ekzemple la jenon:

Mi ne sci'as, kie mi las'is mi'a'n baston'o'n; ĉu vi ĝi'n ne vid'is? (Zamenhof 1887, citita laŭ 1903/1992: 235)

Sekvas priskribo de (imagita) vortaro simila al tiuj, kiujn ni poste ekkutimis nomi ŝlosilo: vortaro enhavanta ne vortojn, sed morfemojn, kaj donanta al ĉiu morfemo gloson en etna lingvo, samkiel en *Universala Vortaro* (Zamenhof 1893, citita laŭ 1905/2007). La rusa sinjoro do serĉas ĉiun morfemon en la vortaro kaj tie trovas la jenajn klarigojn, kiujn Zamenhof montras al ni:

<i>Mi</i>	Ja	ja
<i>ne</i>	nje, njet	nje
<i>sci</i>	znatj	} znaju
<i>as</i>	oznaĉajet nastojaĉeje vremeja glagola	
<i>kie</i>	gdje	gdje
<i>mi</i>	ja	ja
<i>las</i>	ostavljatj	} ostavil
<i>is</i>	oznaĉajet proŝedŝeje vremeja	
<i>mi</i>	ja	} (moj) moju
<i>a</i>	oznaĉajet prilagatelnoje	
<i>n</i>	oznaĉajet vinitelnij padej	
<i>baston</i>	palka	} palku
<i>o</i>	oznaĉajet suŝĉestvitelnoje	
<i>n</i>	oznaĉajet vinitelnij padej	
<i>ĉu</i>	li	li
<i>vi</i>	vi, ti	vi
<i>ĝi</i>	ono	} (jego) jejo
<i>n</i>	oznaĉajet vinitelnij padej	
<i>ne</i>	nje	nje
<i>vid</i>	vidjetj	} vidjel(i)
<i>is</i>	oznaĉajet proŝedŝeje vremeja	

(Zamenhof 1887, citita laŭ 1903/1992: 235-236)³

En la ekzemplo pri la perdita bastono videblas implicitaj premisoj faritaj de la aŭtoro de Esperanto konscie aŭ nekonscie. *Implicita premiso* mi nomas scion ne esprimitan en la teksto, kiu estas necesa por kompreni kaj apliki la regulojn de la lingvo. Implicita premiso en la bastonekzemplo estas la maniero kiel la rusa sinjoro faros la paŝon de la klarigoj el la vortaro al la rusaj frazoj kaj per tio al la propozicio kaj do al kompreno de la enhavo transportata al li per la du Esperantaj frazoj. Ni notu bone: en la ŝlosilo la rusa sinjoro trovas nur la morfemglosojn, donitajn en la meza kolumno de la ĵusa citaĵo. La frazojn, kiuj aperas vorton post vorto en la dekstra kolumno, li mem devas derivi. La implicita premiso do temas pri la interpretado de la signiferoj enhavataj en la Esperantaj morfemoj kaj en la rusaj glosoj.

Ni konsideru pli detale, kiel funkcias tiu paŝo de la glosoj al la frazoj kaj do al la propozicia enhavo. Ni vidu: La afabla sinjoro legas *baston'o'n* kaj trovas la glosojn *baston* → *palka*, *o* → *oznaĉajet suŝĉestvitelnoje* ('signas substantivon') kaj *n* → *oznaĉajet vinitelnij padej* ('signas akuzativon'). El la signiferoj 'palka' kaj 'substantivo' li konkludas, ke temas pri 'palka'. En la rusa ĝi jam estas substantivo, do la dua signifero nenion aldonas. Tamen la tria, 'akuzativo', donas plian informon, tiel ke nia afablulo mense transformas *palka* al *palku*.

Ĉu ĉio bona? Tamen ne. Lingvisto ĉi tie stumblas. Almenaŭ de la tempo de Ferdinand de Saussure (1916/1969: 32, 158) ni konsideras la lingvon sistemo de signoj kaj la signojn kunmetitajn el formo kaj enhavo. La kategorio kazo, ĉi-ekzemple la akuzativo, estas forma kategorio, ne enhava. Do la esenca demando estas, ĉu la formo en Esperanto, etikedita kun la termino *akuzativo*, portas la saman signifon kiel la formo en la rusa lingvo, etikedita kun tiu sama termino? Nia unua ideo eble estas respondi: jes, kial ne? Ĝuste tial ili ja ambaŭ portas la saman etiketon. Sed ĉi tie, kiel dirite, lingvisto stumblas. Ni komparu ne nur ĉi tiun unu frazon, sed la tutan lingvosistemon. Esperanto havas du kazojn, nominativon kaj

³ En *Fundamenta Krestomatio* la rusaj glosoj aperas ĉi tiel en Esperanta transskribo. La rusaj vortoj en la meza kolumno glosas la Esperantajn morfemojn de la maldekstra kolumno. La pli longaj ne estas glosoj, sed klarigoj. Jen tradukoj: *oznaĉajet nastojaĉeje vremeja glagola* 'signas la prezencon de la verbo', *oznaĉajet proŝedŝeje vremeja* 'signas la preteriton', *oznaĉajet prilagatelnoje* 'signas adjektivon', *oznaĉajet vinitelnij padej* 'signas la akuzativon', *oznaĉajet suŝĉestvitelnoje* 'signas substantivon'.

akuzativon, la rusa havas ses: nominativon, genitivon, dativon, akuzativon, instrumentivon kaj prepozitivon. Se ĉiu Esperanta nominativo ekvivalentus al rusa nominativo kaj ĉiu akuzativo al akuzativo, por kio do la rusa havas la aliajn kvar kazojn?

La plurfojaj atentigoj de Tonkin pri la morfemkombina citaĵo de Zamenhof indikas al ni, ke temas pri speciala, neofta okazo, nepre studinda. En ĉi tiu mallonga teksto kaj en la detala klarigo pri la interpretado de la kompleksaj vortoj en la bastonekzemplo la aŭtoro de Esperanto ebligas al ni enrigardi la planadan procezon mem. Tiu principo estas la premiso, ke sufiĉas nomi la gramatikan etiketon de iu morfemo aŭ sintaksa konstruo, kaj jam alilingva leganto scias, kiel interpreti la Esperantan kunmetaĵon. Se diri pli koncize, Zamenhof premisis la interlingvan *enhavan* ekvivalentecon de la gramatikaj kategorioj.

Lingvisto emus nun eksperimente renversi la sistemon kaj serĉi la Esperantajn ekvivalentaĵojn de, ekzemple, rusa dativo. Sed Zamenhof ja ne asertis, ke la rusa funkcias laŭ tia morfemopa glostraduko. Li diris, ke tio estas specialaĵo de Esperanto. Ni do ne rajtas renversi.

Ĉu eble mi tro martelas ĉi tiun solan ekzemplon? Sendube Zamenhof elektis simplan ekzemplon por montri la principon. Li ne tuj volis distri siajn legantojn per reguloj kiel **al* → *oznaĉajet datelnij padeĵ* ('signas la dativon')⁴. Per tio li povintus alveni al la ideo de struktura ŝanĝo en traduko, nomita france *métataxe* 'metataksa' de Tesnière (1959/1982: 283). Sed ni ne scias, kion Zamenhof farintus. Do anstataŭ fari pensajn eksperimentojn, ni studu aliajn specimenojn de tio, kion li fakte faris.

3 Analizi la regulojn

Malfacilas trovi aliajn simile rivelajn priskribojn de la propra planpensado, kvankam Zamenhof ja verkis pri sia lingvokonstrua laboro. Sed ĉi tiu unu jam montras al ni unu el la implicitaj principoj laŭ kiuj Zamenhof konstruis sian lingvon: la principon de la interlingva enhava ekvivalentecon de la gramatikaj kategorioj. Pri tiu premiso ni fakte trovas aliajn privilegiojn en la lingvosistemo de Esperanto kaj en la priskriboj de la sistemo kiujn donas al ni Zamenhof. Tiuj ne estas tiel klaraj kaj detalaj malkaŝoj kiel tiuj jam cititaj, sed estas strukturaj decidoj en la sistemo de Esperanto, el kiuj ni povas konkludi pri la implicitaj premisoj de la aŭtoro.

Kiel ni vidis, ekde la Unua Libro Zamenhof emfazas kiel grave estas konstrui la lingvon facila. Varbante por Esperanto oni kutimas substreki tiun karakterizaĵon kaj oni ofte pravas ĝin montrante la famajn dek ses regulojn (Zamenhof 1887, citita laŭ 1903/1992: 239-241)⁵. Ili estu nia dua studobjekto.

Ni kompreneble scias, ke eblas pri Esperanto verki pli dikajn gramatikojn ol la dek ses regulojn. Tiaj estas ekzemple la *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto* (Kalocsay/Waringhien 1980) kaj la *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* (Wennergren 2005). Sed kvankam Zamenhof titolas la dek ses regulojn "Plena gramatiko de Esperanto" (Zamenhof 1903/1992: 239), nin ĉi tie ne interesu, kiugrade la dek seso estas kompleta. Nin interesas, ke la dek ses reguloj estas la esenco de la gramatiko, kiun Zamenhof donas en la Unua Libro, do en tiu momento kiam li povis pleje certi, ke la legantoj ne jam konas la lingvon. La dek ses reguloj estas la tutunua lernilo de tute nova lingvosistemo. Do ĝi nepre devas esti tre bone komprenebla. Kaj, sciante ke Zamenhof aperigis la Unuan Libron en diversaj lingvoj sen gravaj enhavaj ŝanĝoj, ni povas konjekti, ke li opiniis ke liaj klarigoj en la dek ses reguloj

⁴ La asteriskon mi metas kiel en historia lingvistiko por signi, ke ĉi tiun ekzemplon mi konjektis aŭ konstruis mem.

⁵ Ankaŭ la dek ses reguloj devenas el la Unua Libro kaj estis origine publikigitaj en etnaj lingvoj. Mi citas la Esperantan tradukon el la *Fundamenta Krestomatia*.

estas kompreneblaj por legantoj de multaj lingvoj, almenaŭ por la edukitaj eŭropanoj de la 19-a jarcento.

Do ni legu la dek ses regulojn. En la 6-a regulo ni trovas:

[...] Participoj (kun senco adjektiva aŭ adverba): aktiva estanta *-ant*; aktiva estinta *-int*; aktiva estonta *-ont*; pasiva estanta *-at*; pasiva estinta *-it*; pasiva estonta *-ot*. [...] (Zamenhof 1903/1992: 240)

Tiu frazo informas la legantojn pri la morfemoj signantaj la participojn. Pli Zamenhof ne diras pri participoj. Kiel uzi ilin? Tio restas implicite premisita. La premiso estas, ke oni en Esperanto uzu la participojn kiel en la etnaj lingvoj. Ke en tiuj lingvoj ili tute ne estas uzataj sammaniere, tion li ne diskutas. Ĉu Zamenhof pri tio ne konsciis? Tamen jes. Vidu la 1-an regolon:

Artikolo nedifinita ne ekzistas; ekzistas nur artikolo difinita (*la*), egala por ĉiuj seksoj, kazoj kaj nombroj.

Rimarko. La uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en la aliaj lingvoj. La personoj, por kiuj la uzado de la artikolo prezentas malfacilaĵon, povas en la unua tempo tute ĝin ne uzi. (Zamenhof 1903/1992: 239)

En la Esperanta lingvokomunumo ĉi tiu regulo ĝuas certan famon. En ĝi sufiĉe multo estas implicite premisita. Ni vidu detale. Unue, estas rimarkinde, ke Zamenhof en ĉi tiu regulo konsideris necese paroli ne nur pri la formo, sed ankaŭ pri la uzo. Evidente tion kaŭzis la fakto, ke Zamenhof regis kaj lingvojn kun kaj lingvojn sen artikoloj. Due, la ĝenerala principo de Zamenhof estas doni informon pri la sistemo, sed ne pri la uzo. Sed kio do estas la sistemo, rilate artikolojn? Zamenhof duoneksplicite mencias, ke etnaj lingvoj, se entute, havas kaj nedifinitan kaj difinitan artikolojn. Kaj la rimarko pri la uzo aludas al la fakto, ke ekzistas senartikolaj lingvoj. Kiun el la du modeloj Esperanto sekvas? Nek unu, nek la alian. Esperanto havas difinitan, sed ne nedifinitan artikolon. Ĉu iu el la lingvoj konataj de Zamenhof havas tian sistemon? Jes, la hebrea. Sed ĝin Zamenhof evidente ne volas ĉi tie mencii. Do ankaŭ ĉi-kaze li simple implicite premisas, ke oni scias kiel uzi la sistemerojn difinitajn de li.

4 Konstati la karakteron

Nia tria studobjekto estu la gramatika karaktero de la radikoj. Treege koncizigante longan debaton, ni povas resumi la aferon jene. Se ni havas la verbojn *brosi* kaj *kombi*, kial do la instrumentoj nomiĝas *broso* kaj *kombilo*? Ĉar la radiko *bros'* estas substantiva kaj la radiko *komb'* verba. Sed nenie en la dek ses reguloj Zamenhof diris al ni, ke ekzistas verbaj kaj substantivaj radikoj. Ĝi estas implicita premiso, transprenita el la etnaj lingvoj. Ni scias, ke tiu demando kaŭzis, kaj de tempo al tempo ankoraŭ kaŭzas vervan debaton. En ĝi argumentas tiuj, kiuj firme kredas, ke en Esperanto ĉio estas facila, tiel ke io komplikita ne povas esti Esperanta, kontraŭ tiuj, kiuj trankvile lingvistike observas kaj analizas la lingvon kaj trovas en la modelo de la gramatika karaktero taŭgan klarigon de la observeblaj faktoj⁶. Ĉu oni devas intuicie scii, kiun karakteron posedas certa radiko? Sendube la unuaj esperantistoj tion faris, kaj per tio, ke inter ili ekestis grandparte kohera uzo, ili validigis kaj pluekzistigis la vortfaradon bazitan sur la gramatika karaktero. La intuicio de la unuaj esperantistoj sendube fontis el ilia rego de etnaj lingvoj, ĉefe do el la eŭropaj lingvoj kaj la antikvaj lingvoj studataj en la tiuepokaj gimnazioj en Eŭropo. Sed la etnolingva intuicio ne estas la sola fonto de scio. Oni povas informiĝi pri la gramatika karaktero de la radikoj en la vortaroj de Esperanto. Jam en *Universala Vortaro* (Zamenhof 1893, citita laŭ 1905/1963) Zamenhof

⁶ La vortfarado kaj precipe la gramatika karaktero estis unu el la ĉefaj disputoj inter la defendantoj de Esperanto kaj la partianoj de Ido antaŭ centoj da jaroj. Vidu ekzemple Couturat (1907/1910) kaj René de Saussure (1910, 1914).

implicite donas al la radikoj gramatikan karakteron, glosante la senfinajn radikojn per verboj aŭ substantivoj aŭ adjektivoj ktp. en la franca, angla, germana, rusa kaj pola. Li faris tion plej grandparte kohere, do glosante per samkategoriaj vortoj en ĉiuj kvin etnaj lingvoj, kaj li zorgis indiki la kategorion, kiam la izolita vorto en la koncerna etna lingvo, plej ofte la angla, estas ambigua. Jen ekzemplo:

“**melk'** traire | milk (vb.) | melken | doit' | doiĉ”

(Zamenhof 1893: 137, citita laŭ 1905/1963: 191)

Plena Ilustrita Vortaro (Waringhien/Duc Goninaz 2005) listigas vortojn kun finaĵo, sed zorge aranĝas siajn artikolojn tiel, ke ĉiam la unua vorto, sub kiu la tuta artikolo estas enalfabetigita, estas tiu indikanta la gramatikan karakteron. Do la artikolojn pri *bros'* kaj *komb'* PIV komencas per la vortoj *bros'o* kaj *komb'i*. Tiel PIV informas pri la gramatika karaktero – implicite.

5 Funkciigi la lingvon

Konklude, kion do la tri studobjektoj instruas al ni? Ni scias, ke Zamenhof ricevis amason da demandoj pri lingva ĝusteco kaj respondadis ilin en leteroj kaj revuartikoloj. Unu el liaj plej oftaj respondoj, dirita por tiuj, kiuj esperis ricevi klare obeeblan regulon, estis (en miaj vortoj): “Tion la uzo decidis” (ekz. Zamenhof 1910/1990: n-roj 13, 44, 110). Ĉu do Zamenhof estas nura konstruinto de la lingvosistemo, lasante la uzon al hazardo? Ne. Li metis en sian lingvosistemon la potencialon por evoluo kaj li ja donis al ĝia evolukapablo difinitan direkton. Tiu direkto implicite kaŝiĝas en la aglutina vortfarado kaj en la malpreciza konekto al la etnolingvaj modeloj, por kio la partecipoj kaj la gramatika karaktero estis niaj ekzemploj en ĉi tiu studo.

Konstruante sian lingvon sur premisita scio de la uzantoj, Zamenhof igis sian lingvon akceptebla kaj per tio facila. Ligante la lingvon al la premisebla scio pri la etnolingvaj modeloj nur malprecize (“jen partecipo, decidu inter vi mem ĉu uzi ĝin germanece aŭ anglece” – denove miavorte), Zamenhof donis al la esperantistoj lingvan liberecon kaj per tio akceptis ĉiun el ili en la lingvokomunumon, eĉ tiujn, kiuj en la komenca tempo tute ne regis la artikolojn. Tio lasis eblon por fervoraj debatoj kaj disputoj, ekzemple sur praktika lingvouza nivelo pri la partecipoj (*-ata/-ita*) aŭ sur teoria lingvoklariga nivelo pri la gramatika karaktero. Sed la baza principo doni al la lingvosistemo direktitan evoluivon, tio igas la studĉambran sistemon stabila, kreskiva lingvo de vivantaj homoj. Pri tio Tonkin atentigas nin.


Bibliografio

- Blanke, Detlev (1985): *Internationale Plansprachen. Eine Einführung*. Berlin: Akademie-Verlag (Sammlung Akademie-Verlag 34, Sprache).
- Couturat, Louis (1907): *Étude sur la dérivation en Esperanto*. Coulommiers: Brodard. – 2-a eld. (1910): *Étude sur la dérivation dans la langue internationale*. Paris: Delagrave.
- Duliĉenko, Aleksandr Dmitrievič (1990): *Meždunarodnye vspomogatel'nye jazyki*. Tallinn: Valgus.
- Gode, Alexander; Hugo E. Blair (1951): *Interlingua: a Grammar of the International Language*. 2-a eld. 1971. New York: Ungar.
- Kalocsay, Kálmán; Gaston Waringhien (1980): *Plena analiza gramatiko de Esperanto*. 4-a eld. Rotterdam: UEA.
- Kolker, Boris Grigor'evič (1984): *Vlijanie russkogo jazyka na leksiku meždunarodnogo jazyka esperanto*. Manuskripto. Moskva: Institut jazykoznanija AN SSSR.
- Saussure, Ferdinand de (1916): *Cours de linguistique générale*. Red. Charles Bally, Albert Sechehaye kun Albert Riedlinger. Nova eld. 1969. Paris: Payot.

- [Saussure, René de] Antido (1910): *La logika bazo de vortfarado en Esperanto*. Genève: Universala Esperantia Librejo.
- Saussure, René de (1914): *La vort-teorio de Esperanto*. Genève: Universala Esperantia Librejo.
- Schubert, Klaus (2001): "Optimumigo de la internacia komunikado: interlingvistika rigardo al la nova industria lingvokonstruado". En: Sabine Fiedler, Liu Haitao (red.), *Studoj pri interlingvistiko / Studien zur Interlinguistik. Festlibro omaĝe la 60-jariĝo de Detlev Blanke*. Dobřichovice (Praha): KAVA-PECH, p. 172-183.
- (2008): "Konstruktion und Reduktion". En: Hans P. Krings, Felix Mayer (red.), *Sprachenvielfalt im Kontext von Fachkommunikation, Übersetzung und Fremdsprachenunterricht*. Berlin: Frank & Timme (Forum für Fachsprachen-Forschung, 83), p. 209-219.
- Tauli, Valter (1968): *Introduction to a Theory of Language Planning*. Uppsala: Almqvist & Wiksell (Acta Universitatis Upsaliensis, Studia Philologicae, 6).
- Tesnière, Lucien (1959): *Éléments de syntaxe structurale*. 2-a eld. 4-a represo 1982. Paris: Klincksieck.
- Tonkin, Humphrey (2001a): "The Role of Literary Language in Esperanto". En: Klaus Schubert (red.), *Planned Languages: From Concept to Reality*. Brussel: Hogeschool voor Wetenschap en Kunst, p. 11-35.
- (2001b): "Esperantologio eksogena kaj endogena". En: Sabine Fiedler, Liu Haitao (red.), *Studoj pri interlingvistiko / Studien zur Interlinguistik. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke*. Dobřichovice (Praha): KAVA-PECH, p. 307-325.
- Waringhien, Gaston; Michel Duc Goninaz (2005, red.): *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2005*. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- Wennergren, Bertilo (2005): *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*. El Cerrito: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko. Konsulteblo ĉe <http://bertilow.com/pmeg>.
- [Zamenhof, L.L.] D-r Ĝesperanto (1887): *Meždunarodnyj jazyk*. Varšava: Kel'ter.
- Zamenhof, L.L. (1893): *Universala vortaro*. – Citita laŭ Zamenhof (1905/1963). – http://www.akademio-de-esperanto.org/fundamento/universala_vortaro.html.
- (1903): *Fundamenta krestomatio de la lingvo Esperanto*. Paris: Hachette. – 18-a eld. 1992. Red. G. Waringhien. Roterdamo: UEA.
- (1905/2007): *Fundamento de Esperanto*. 11-a eld. Red. André Albault. Pisa: Edistudio. – <http://www.akademio-de-esperanto.org/fundamento/index.html>.
- (1910): *Lingvaj respondoj*. 7-a eld. 1990, red. G. Waringhien. Kioto: Ludovikito.
- (1929): *Originala verkaro*. Red. Johannes Dietterle. Leipzig: Hirt.
- (1973): *Unuaj libroj por esperantistoj*. Red. Ludovikito [ps. de Itō Kanzi]. Kioto: Ludovikito (Plena verkaro de L.L. Zamenhof, 1).

Klaus Schubert

Nask. 1954. Lingvisto; profesoro en la Universitato de Hildesheim, Germanio (ekde 2009), pri aplika lingvistiko, precipe internacia faka komunikado, antaŭe profesoro en la Faka Universitato de Flensburg. Esplorterenoj: aplika lingvistiko, tradukologio, faka komunikado, interlingvistiko, komputa lingvistiko; laboris por la tradukprojekto DLT (1985-1990). Verkis *Interlinguistics* (red., 1989), *Planned languages: From concept to reality* (red., 2001), *Wissen, Sprache, Medium, Arbeit* (2007).



La arto labori kune

Festlibro por Humphrey Tonkin

Redaktis Detlev Blanke kaj Ulrich Lins

Universala Esperanto-Asocio



M
Schmidrop
M
Jankin

La arto labori kune

Festlibro por
Humphrey Tonkin

Redaktis
Detlev Blanke kaj Ulrich Lins

Universala Esperanto-Asocio
Rotterdam 2010

ISBN 978-92-9017-113-3

© 2010 Universala Esperanto-Asocio

Kovrilo: Francisco L. Veuthey

Presita ĉe Drukkerij Bariet B.V., Nederlando

Enhavo

I	ENKONDUKE	
	Antaŭparolo	13
	<i>Probal Dasgupta</i>	
	Enkonduko	14
	<i>Detlev Blanke / Ulrich Lins</i>	
	Omaĝo	19
	<i>Ludoviko K. Zaleski-Zamenhof</i>	
	“Mi kvazaŭ trovis min ĉehejme”. Biografia konversacio kun Humphrey Tonkin	20
	<i>Mark Fettes</i>	
II	LINGVOPOLITIKO KAJ LINGVOPLANADO	
	Humphrey Tonkin kaj <i>Language Problems and Language Planning</i>	47
	<i>Frank Nuessel</i>	
	Lingvo – rimedo aŭ resurso?	51
	<i>Jouko Lindstedt</i>	
	Komunikado kiel fonto kaj motoro de lingva evoluo	63
	<i>Vilmos Benczik</i>	
	La lingvoj: nemateria kultura heredaĵo	76
	<i>Rafaela Uruña Álvarez</i>	
	La lingvobariero kaj la rimedoj por superi ĝin	85
	<i>Dan Maxwell</i>	
	Lingvaj rajtoj kaj lingva justeco	97
	<i>Bengt-Arne Wickström</i>	
	Lingvoplanado kaj planlingvoj	104
	<i>Federico Gobbo</i>	
	Lingvaj Problemoj kaj Lingva Planado. Sub la aspekto de informadika tekniko	109
	<i>Liu Haitao</i>	
	Vojoj al egalrajta komunikado. Pri kelkaj proponoj kaj reagoj en la fakliteraturo	124
	<i>Sabine Fiedler</i>	
	De la germana al la angla en sveda ekonomiko	136
	<i>Bo Sandelin</i>	
	La angla kaj Esperanto: pripensoj pri la estonteco	145
	<i>Dalibor Brozović †</i>	
	Esperanto kaj Eŭropa Unio: ĉu miraĝo, ĉu perspektivo?	147
	<i>István Ertl</i>	
	Lingva diverseco kaj la internaciigo de la universitatoj en Eŭropo	156
	<i>Michele Gazzola</i>	
	Lingvaj homaj rajtoj en Barato. La breĉo inter politiko kaj praktiko	162
	<i>A. Giridhar Rao</i>	

	La kornvala kaj Esperanto: entreprenoj similaj? <i>Kimura Goro Christoph</i>	171
	La lernado de la irlanda lingvo: ĉu helpe de Esperanto? <i>Seán Ó Riain</i>	178
III	INTERLINGVISTIKO	
	Interlingvismo kaj scienca kulturo <i>José Antonio Vergara</i>	187
	Memorando pri interlingvoj kaj interlingvistiko <i>Sergej N. Kuznetsov</i>	193
	Tezoj pri la slava interlingvistiko <i>Aleksandr D. Duliĉenko</i>	206
	Arto inter lingvo kaj literaturo <i>Věra Barandovská-Frank</i>	209
	Planlingvaj impulsoj por terminologoj: Wüster, Drezen, Warner <i>Wera Blanke</i>	223
	Kreo de CDELI kaj ĝia nuna situacio <i>Claude Gacond</i>	233
	Kiel organizi interlingvistikan agadon? Kelkaj spertoj de GIL <i>Detlev Blanke</i>	241
IV	ESPERANTOLOGIO	
	La neebleco de priesperanta lingvoscienco <i>Ken Miner</i>	259
	La Fundamenta Esperanto: nekontesteble eŭropa, sed... <i>Wim Jansen</i>	271
	Ĉefaj strukturaj principoj de Esperanto <i>Boris Kolker</i>	285
	Esperantlingva bildo de la mondo <i>Ilona Koutny</i>	290
	Instruoj kaj truoj de la Ekzercaro <i>Geraldo Mattos</i>	306
	Frazeologio, kunokazemo kaj leksiko-gramatiko. La ekzemplo de predikato-komplemento-esprimoj en Esperanto <i>Christopher Gledhill</i>	323
	Reflektiĝo de la specifa Esperanto-kulturo en publicistiko <i>Aleksandro S. Melnikov</i>	339
	TON-KIN-O. Aŭ: El la rekvizitejo de la Esperanto-poezio <i>Till Dahlenburg</i>	350
	Kiam Zamenhof perdis sian bastonon. Implicitaj premisoj en planlingvo <i>Klaus Schubert</i>	355
	La frazmelodio en internacia perspektivo <i>John Wells</i>	363

	Ŝanĝiĝo de la vortaro en kreolaj lingvoj: la ekzemplo de Esperanto	373
	<i>Renato Corsetti</i>	
	Sistemo de sufiksoj en etnolingvoj kaj en Esperanto. Similaĵoj kaj diferencoj	386
	<i>Otto Prytz</i>	
	Kelkaj rimarkoj pri la problemoj de tradukado	395
	<i>Michel Duc Goninaz</i>	
V	HISTORIO	
	Hilelismo, homaranismo kaj neŭtrale-homa religio	401
	<i>Christer Kiselman</i>	
	Kritika retrorigardo al la “tezoj” de <i>Esenco kaj estonteco</i>	415
	<i>Marc Bavant</i>	
	Klopodoj pri lingvokontrolaj institucioj de la Unua Libro ĝis la Lingva Komitato	426
	<i>Carlo Minnaja</i>	
	Zamenhof, psikologie: de Freud al Piron	438
	<i>E. James Lieberman</i>	
	Ruĝ-verda malakordo. Observoj pri komunistaj esperantistoj	443
	<i>Ulrich Lins</i>	
	Inter laborista edukado kaj kultura alternativo.	
	Kial laboristoj lernis Esperanton en Hispanio en la komenco de la 20-a jarcento	462
	<i>José Antonio del Barrio</i>	
	Esperanto kiel araba-juda lingvo, 1924-1948	473
	<i>Doron Modan</i>	
	Vanaj klopodoj eldoni Esperanto-revuon en la sovetiaj kondiĉoj	481
	<i>Vladimir Samodaj</i>	
	Ota Ginz. Esperantisto en Ĉeĥoslovakio	491
	<i>Vlastimil Novobilský</i>	
	En la ombro de aŭroro: pri Takasugi Itirô	498
	<i>Tacuo Huĝimoto</i>	
	Sur la spuro de Elpin	503
	<i>Shi Chengtai</i>	
	De TJO al TEJO al TONKIN	507
	<i>Ed Borsboom</i>	
VI	MOVADO KAJ KOMUNUMO	
	Idealo kaj utilo	517
	<i>Werner Bormann</i>	
	La esperanta malpopolo	521
	<i>Jorge Camacho</i>	
	Ĉu “diabla cirklo”? Direkte al sociologia esploro pri UEA	529
	<i>Zbigniew Galor</i>	
	Enketa esploro pri Universalaj Kongresoj	542
	<i>Nikola Rašić</i>	

La katalunaj esperantistoj. Socilingvistika trarigardo <i>Hèctor Alòs i Font</i>	558
<i>The geek shall inherit the earth.</i> Esperanto-movado kaj vikipedia komunumo en la epoko de la Interreto <i>Ziko van Dijk</i>	574
VII APLIKO KAJ DISVASTIGO	
Interkultura edukado per Esperanto <i>Radojica Petrović</i>	585
Edukado.net. La porinstruista retejo kaj ESF <i>Katalin Kováts</i>	594
Didaktikaj paŝoj <i>Stefan MacGill</i>	605
Esperanto kaj medicino <i>Imre Ferenczy</i>	612
Pri la faka agado de la fervojistaj esperantistoj <i>István Gulyás</i>	619
SAEST kaj KAEST. Pri fakaplikaj aranĝoj en Ĉeĥio kaj Slovakio <i>Petro Chrdle</i>	627
Du jardekoj de Internacia Kongresa Universitato <i>Amri Wandel</i>	636
Esperantaj elsendoj kiel natura lingvomedio <i>Barbara Pietrzak</i>	644
Kiel aŭdigi nin en la amaskomunikiloj? <i>Thomas Bormann</i>	652
Gramatikaj fenomenoj en komputila internaciigo <i>Reinhard Fössmeier</i>	658
Kie fluas lakto kaj mielo <i>Mauro La Torre</i>	663
Semantikaj suplementoj al sintaksaj dependo-arboj en TRUKILO <i>Victor Sadler</i>	678
Novjarmila teĥnologio: ĉu ĝi forpelos aŭ kreos analfabetecon? <i>Toon Witkam</i>	684
VIII LITERATURO	
La postnacia literatura entrepreno kaj Esperanto <i>Probal Dasgupta</i>	695
Kial vi verkas? <i>Trevor Steele</i>	702
Sub la spoto. Movado kaj movadanoj en la originala dramarto Esperanta <i>Paul Gubbins</i>	704
Ĉiu memoro estas protesto <i>Georgi Mihalkov</i>	715

	Humphrey Tonkin, tradukinto de Shakespeare <i>Baldur Ragnarsson</i>	720
	Al Tonkin pri Tolkien. Aŭ: Kial serioza universitata profesoro interesiĝu pri <i>La mastro de la ringoj</i> ? <i>Anna Löwenstein</i>	728
	Sinjoro Tadeo parolas Esperante <i>Roman Dobrzyński</i>	736
	Ĉina klasika beletro en Esperanto <i>Laŭlum</i>	748
	Kial valoras legi literaturon en Esperanto? <i>Duncan Charters</i>	761
IX	STRATEGIO	
	21-a jarcento – ĉu la Esperanto-movado pretas? <i>Peter Baláž</i>	771
	Estonto de la cifereca mondo <i>Miroslav Malovec</i>	776
	Plurlingvismo kaj Esperanto. Ideologia ŝanĝiĝo en la Esperanto-movado <i>Jukka Pietiläinen</i>	781
	Protektado de minacataj lingvoj kaj kulturoj. Partnereco de UEA kaj UN sub lupeo <i>Edmond Brent</i>	793
	La financa strategio de Universala Esperanto-Asocio, 1974-1980 <i>Grégoire Maertens</i>	805
	La historio kaj strategio de Esperanto-movado en Azio, 1989-1995 <i>So Gilsu</i>	810
X	ANEKDOTOJ KAJ REMEMOROJ	
	Humphrey Tonkin: la klereco de la koro <i>Marjorie Boulton</i>	821
	Humphrey Tonkin, universitata studento <i>Diccon Masterman</i>	824
	Kure tra duona jarcento <i>Michela Lipari</i>	827
	Pri kaj por Humphrey Tonkin <i>Ursula Grattapaglia</i>	829
	Humphrey Tonkin: <i>eminence grise</i> de la Esperanto-movado <i>Hans Bakker</i>	831
	TEJO de mia epoko retrospektive <i>Ivo Osibov</i>	832
	Humphrey Tonkin – 25jarulo <i>Hans Michael Maitzen</i>	839
	Junulara Esperanto-vivo en Svedio en la 1960-aj jaroj <i>Ulla Luin</i>	841

Tyresö – ĝiaj kongreso kaj deklario <i>Tomas Jansson</i>	844
Memoroj <i>Bruce Sherwood</i>	847
Revo kaj realo. Renkontiĝo antaŭ 45 jaroj <i>György Nanovfszky</i>	848
Li apartenas al mia Esperanta vivo... <i>Renée Triolle</i>	851
Fragmente pri Universala Kongreso <i>Syôzi Keiko</i>	852
Vizito trans la Feran Kurtenon <i>Mikaelo Bronštejn</i>	853
Ĉiama Esperanto-parolanto <i>Stefan MacGill</i>	857
La riparo de kongresa flago <i>Petâr Todorov</i>	858
El la taglibro de Wera Dehler (1981) <i>Wera Blanke</i>	860
Ironio milda <i>Eliza Kehlet</i>	863
Al monto sublima, admiro senfina <i>Tan Xiuzhu</i>	864
Impresoj pri Humphrey Tonkin <i>Orlando E. Raola</i>	867
Memoroj de junaĝo pri Humphrey Tonkin <i>Jennifer Bishop</i>	868
Somero 1993 en la hejmo Tonkin <i>Spomenka Štimec</i>	870
Facila vento ekblovas en EU <i>Etsuo Miyoshi</i>	871
XI ALDONOJ	
Mallongigoj	877
Bibliografio de la verkoj de Humphrey Tonkin	878

I
ENKONDUKE

Antaŭparolo

La fenomenon Humphrey Tonkin la esperantistoj jam de longe konas, sed malofte eksplicite kaj dismete priparolas. Mallonge diri – kion oni ofte faras – ke li gvidis la organizitan movadon el sakstrato, ne sufiĉe priskribas la kernon de la fenomeno Tonkin. Foje unu vinjeto faras la laboron de mil vortoj. Al iuj legantoj certe helpas, se mi diros, do, ke komence de kanta kasedo de Ĝanfranko Molle aŭdiĝas el kongresa parolado de Humphrey (post la supozeblaj, sed neaŭdataj antaŭvortoj “Se Zamenhof estus inventinta la zipon...”) la vortoj “... ni ĉiuj hodiaŭ zipus kaj malzipus per la inventaĵo de Zamenhof”. Sed mi havas antaŭ mi ankaŭ legantojn, sur kiujn ne vere efikas unu tia anekdoto – kvankam tiu ĉi vinjeto tre bone ilustras la pensan stilon de Tonkin.

Al la legantoj, kiuj ne tiom reagas al unu anekdoto, mi faras jenan peton. Imagu mondon, en kiu li ne estus tia fakulo pri la renesanca angla literaturo, kiu ne nur profesias pri ĝi, sed persone amas la verkojn de tiu granda florado. Mondon, en kiu li ne estus unu el la ĉefaj motoroj de la procezo Tyresö en 1969. Mondon, en kiu li ne ĉefrolus dum jardekoj en la veturigado de la klasika ĉaro Centro de Esploro kaj Dokumentado, per kiu la postmilita UEA volis krei lavangon da socisciencaj argumentoj favore al la adopto de Esperanto kiel mondolingvo, kaj en la stirado de la postklasika ĉaro Esperanta Stud-Fondaĵo, per kiu nord-amerika iniciato volis en la reta epoko rapide krei rimedojn por solidigi la instruon kaj sciencajn bazojn de la lernado kaj utiligado de Esperanto. Mondon, en kiu li ne estus dum jardekoj aktiva membro de la Akademio de Esperanto kaj kompilanto de la pri-Esperanta parto de la bibliografio de Modern Language Association, sed estus akuzative erarema meza uzanto de la lingvo. Ankaŭ en tia mondo, eventuale iu unuopulo nomata Humphrey Tonkin estus gvidinta la movadon el sakstrato. Sed tio ne estus la sama gvidado. En tia mondo, temus pri lerta manovrado surbaze de hazardaj cirkonstancoj.

Sed ni vivas en la reala mondo, en kiu Tonkin faris ĉion ĉi kaj multon pli. En nia mondo, nia Tonkin donis al ni tiel multe, ke ni bezonas almenaŭ iom el lia energio por preni de li. Indikojn, ke kelkaj inter ni havas tian energion, liveras la nuna rikolto da eseoj, per kiuj ni salutas lin okaze de lia datreveno. Li estas sufiĉe renesanca, ke mi permesas al mi uzi avangarde litomiŝlan sufikson kaj deziri... feliĉan sepdekjaralon, Humphrey!

PROBAL DASGUPTA

Enkonduko

La kontribuintoj de tiu ĉi festlibro kolektiĝis por omaĝi al Humphrey Tonkin okaze de la 70-a datreveno de lia naskiĝo.

Kiu estas Humphrey Tonkin? La demando eble ŝajnas superflua, ĉar la jubileulo estas bone konata al la plej multaj legantoj. Tiu konateco verŝajne tamen rilatas ĉefe al la esperantisto Tonkin. Necesas tial skizi la kompleksecon de liaj agado kaj personeco. Tio ne estas facila tasko, ĉar temas pri homo, kiu estas samtempe sciencisto, universitata edukisto, organizanto kaj – ne laste – unu el la plej influhavaj agantoj de la Esperanto-komunumo dum la lastaj jardekoj. Ke en lia vivo interplektiĝas diversaj agado-sferoj, li mem, tuŝante precipe la rilatojn inter sia esperantista agado kaj la profesia aktivado, klarigis en sia libro *Lingvo kaj popolo* (p. 100):

[...] mi ĉiam klopodis enporti en mian Esperanto-vivon ideojn, kiujn mi trovis ekster ĝi, kaj ĉiam alporti el tiu Esperanto-vivo nociojn kaj konceptojn, kiujn mi povas uzi en aliaj medioj. Mi povas diri, ke granda parto de mia profesia kariero baziĝas sur spertoj, kiujn mi travivis en la Esperanto-medio – kaj inverse. Mi rekomendas mian strebon al mensa ekvilibro ankaŭ al miaj kolegoj...

Multajn pruvojn pri tio montras la intervjuo, kiun Mark Fettes faris kun Humphrey Tonkin por tiu ĉi libro. Tiu teksto, en kiu Tonkin propravorte aŭdigas sin pri gravaj travivaĵoj kaj etapoj de sia vivo, bone kompletigas nian enkondukon.

Ni iom pli detale prezentu liajn vivon kaj profesionan karieron. (Anglalingva superrigardo estas ĉe <http://uhaweb.hartford.edu/tonkin/bio.html>.)

Humphrey Tonkin naskiĝis la 2-an de decembro 1939 en Truro en Cornwall, la iam kelta sudokcidenta parto de Anglio (pri ĝi legu la ĉi-libran kontribuadon de Kimura). Li studis anglan filologion en la Universitato de Kembriĝo (Cambridge, Anglio) kaj akiris diplomon en 1962. Samjare stipendio ebligis al li postdiplomajn studojn en Usono, nome en la prestiĝa Universitato Harvard (Cambridge, Massachusetts). Li frue malkovris sian amon al la brita renesanca literaturo. Tio en Harvard gvidis lin al doktoriĝo pri la ĉefverko de Edmund Spenser (1552-1599), *The Faerie Queene* (La fe-reĝino). Nun li estas konsiderata unu el la ĉefaj specialistoj pri Spenser, kiel montras interalie lia estraraneco en la “Renaissance Society of America” kaj membreco en la redaktaj komitatoj de la eldonaĵoj *Spenser Studies* kaj *Medieval and Renaissance Literary Studies*. En 1983/84 li estis prezidanto de “International Spenser Society”. En sia kontribuado al tiu ĉi libro Baldur Ragnarsson atentigas, ke Tonkin multe okupis sin ankaŭ, precipe en la lastaj jaroj, pri William Shakespeare.

Post la doktoriĝo Tonkin estis unue docento, poste profesoro pri angla literaturo ĉe la Universitato de Pensilvanio, Filadelfio, kie li ankaŭ je diversaj stadioj rolis kiel asista vicprezidanto pri subdiplomaj studoj (kun respondeco pri reformo de la bakalaŭraj stud-programoj de la universitato), kiel estro de la Kolegio Stouffer ĉe la universitato, kunordiganto de internaciaj programoj, kaj direktoro de unuajaraj studoj en la angla. De 1983 ĝis 1988 li estis prezidanto (rektoro) de la Kolegio Potsdam, apartenanta al la Ŝtata Universitato de Novjorko.

En 1989 li sekvis inviton iĝi prezidanto de la Universitato de Hartford (Hartford estas la ĉefurbo de la usona ŝtato Connecticut). En tiu funkcio li sukcesis altigi la intelektan kaj sciencajn reputacion de la universitato. Ekzemple, li organizis la aliĝon de plia kolegio al la universitato, fondis novan kolegion por dumviva klerigado, formis novajn ligojn kun la urbaj instancoj de Hartford (inkluzive stipendian programon), intensigis la internaciajn kontaktojn de la universitato kaj signife kreskigis ĝian kapitalon.

Post sia retiriĝo de la prezida ofico en 1998 li plu instruadas en Hartford kiel “University Professor of the Humanities”, la plej alta profesora rango atingebla en Usono. Li lekcias pri Shakespeare por la angla kaj la teatra fakoj de la universitato, kaj pri la rilatoj inter lingvo kaj socio por la fako pri fremdaj lingvoj. En 1999 prof. Tonkin ricevis honoran doktorecon de la Universitato de Hartford.

Humphrey Tonkin prelegis en multaj landoj pri literaturo, internaciaj studoj, lingvopolitiko, Esperanto kaj aliaj temoj. En 1975/76 li pasigis unujaran esplor-restadon en la Universitato de Oksfordo, Anglio. Li estis gastprofesoro pri angla kaj kompara literaturoj en la Universitato Columbia, Novjorko (1980-1981) kaj en la Universitato Yale, New Haven (1998-1999).

Necesas konstati, ke Tonkin ne nur estas elstara literatursciencisto, sed ĉiam forte interesiĝis pri lingvistiko. Tion montras liaj socilingvistikaj, interlingvistikaj kaj esperantologiaj aktivadoj kaj verkoj, sed ankaŭ lia membreco en la estraro de la Centro pri Aplika Lingvistiko en Vaŝingtono kaj en la redaktaj komitatoj de la revuo *Language International* (1990-1996) kaj la libroserio *Impact: Studies in Language and Society* (1996-1999). De 1979 ĝis 1983 li estis redaktoro de *International Education Review*.

Inter liaj anglalingvaj verkoj troviĝas libroj pri la poezio de Edmund Spenser kaj granda nombro da sciencaj artikoloj. Kune kun sia posta edzino Jane Edwards li verkis libron pri internacia edukado (*The World in the Curriculum*, 1981). Li krome redaktis plurajn kolektojn de artikoloj kaj konferencaj aktoj, laste *Language in the 21st Century* (kun Timothy Reagan, 2003). En la fino de tiu ĉi volumo troviĝas plena listo de la verkoj de Tonkin.

Ne estas surprize, ke en la universitata aktivado de Humphrey Tonkin ĉiam tre gravas la internacia perspektivo. Specialan atenton li donis al la internacia interŝanĝo de studentoj kaj profesoroj. Lige kun tio li estis estrarano de la Kanada Komisiono Fulbright (1998-2003), de la “American Forum for Global Education” (1998-2003) kaj de la programo “World Learning”, kiu celas frue eduki al internacieca pensmaniero (1998-2007). Li prezidis la Konsilion por Internacia Interŝanĝo de Universitatoj (CIES, 1988-1994), kiu administras la Programon Fulbright por la internacia interŝanĝo de profesoroj. Li daŭre estas ankaŭ estrarano de la “International Partnership for Service-Learning and Leadership”, kiu subtenas la kunligon de universitataj studoj kaj socia servado (pri tio li kunverkis kaj redaktis la libron *Service-Learning Across Cultures: Promise and Achievement*, 2004).

Sed li agadis ne nur laŭ internaciaj dimensioj. Kvazaŭ por subteni la principon, ke en epoko de tutmondiĝo gravas ne perdi la ankriĝon en loka kadro, prof. Tonkin prizorgas ankaŭ sian ĉirkaŭaĵon. En Potsdam li kunfondis du lokajn organizaĵojn pri ekonomia evoluigo. Li estas konsiliano de la Usona Lernejo por Surduuloj, de la Hartforda Hospitalo kaj de la urba biblioteko. Antaŭe li estis estrarano de la Simfonia Orkestro de Hartford, la regiona konsilio pri belarto kaj la regiona Konsilio pri Mondaj Aferoj (World Affairs Council).

Jam en 1970 Humphrey Tonkin ricevis la Lindback-premion pro elstara lekciado. Inter la diversaj aliaj honorigoj, kiujn li ricevis, estas premioj pro liaj meritoj pri la urbo Hartford, lia laboro por homaj rajtoj, kaj lia agado pri dumviva edukado. La usona asocio de internaciaj edukistoj (NAFSA) donis al li en 2006 la Premion Cassandra Pyle.

Humphrey Tonkin havas du ŝtatanecojn, la britan kaj la usonan.

Li estas samtempe “mondano”, kiel montras lia esperantisteco. Li lernis la lingvon kiel 15-jara gimnaziano. Sekvinte korespondan kurson de Brita Esperanto-Asocio (BEA), li metis anonceton en *Heroldo de Esperanto*. Preskaŭ kvar jardekojn poste li memoris: “Kiel frenezulo, mi komencis korespondi kun ĉiuj ... kvindek reagintoj! Kaj efektive mi tiel lernis pli ol ĉe kursoj.” (Intervjuo, *Kontakto*, 1993, n-ro 137/138, p. 2) La unuajn paŝojn en “Esperantujo” li faris antaŭ kaj paralele al sia studado. Jam frue montriĝis lia organiza talento.

Studante en Kembriĝo, li iniciatis la fondon de junulara sekcio de Brita Esperanto-Asocio, la Junularo Esperantista Brita (1960). Li krome organizis la 17-an TEJO-kongreson en Wokingham; tie li eniris la estraron de TEJO (1961). Pri tiu frua periodo vive rakontas la ĉi-libraj kontribuajoj de Marjorie Boulton kaj Diccon Masterman, same, ankaŭ pri la posta kariera kaj movada evoluo, la jam menciita intervjuo de Mark Fettes kun Tonkin.

De 1969 ĝis 1971 Tonkin estis prezidanto de TEJO. En tiuj jaroj li instigis la junularan Esperanto-movadon malfermi sin al la ĉirkaŭa socio kaj forlasi tro malvaste komprenatan neŭtralecon. Tion ekzemple atestas la Deklaracio de Tyresö, pri kiu en tiu ĉi libro memorigas la kontribuajoj de Tomas Jansson, Ulla Luin kaj Ivo Osibov. Post dekjara estraraneco en TEJO li decidis retiriĝi, ankaŭ por havi pli da tempo por siaj universitataj taskoj.

Sed jam en 1974, responde al insista petado, li konsentis esti kandidato por la gvida posteno en UEA. Tio okazis en komplika situacio. Ne eblis trovi interkonsenton kun la ĝistiama prezidanto, Ivo Lapenna, kiu en oktobro 1973 proponis al Humphrey Tonkin eniri la estraron kiel ĝenerala sekretario. Lapenna estis homo, kiun Tonkin admiris kaj kiu estis lia ĉefa modelo kiel movada gvidanto. Li multon lernis de Lapenna – el lia profunda kono de la Esperanto-movado kaj lia maniero prezenti la lingvon al la ekstera mondo. Tamen en la rilatoj inter Lapenna kaj multaj aktivuloj amasiĝis problemoj kaj kontraŭdiroj. Fine Lapenna ekŝiĝis el ĉiuj funkcioj de UEA. Tonkin, ankoraŭ ne 35-jara, iĝis prezidanto. Lian prezidantecon akompanis fortaj emocioj sekve de la foriro de Lapenna, sed Tonkin suverene demonstris, ke li preferas persiste labori por la bono de UEA kaj ĝiaj membroj.

La unua, sesjara prezidado de Humphrey Tonkin estas memorata unuavice pro siaj efektivaj atingoj: la akcepto de nova statuto de UEA, la intensigo de la kontaktoj kun UN kaj Unesko (kio rezultigis plialtigon de la nivelo de konsultaj rilatoj kaj rezolucion de Unesko apogon al la laboro de UEA), kaj la restabiligo de la Asocio post malfacila organiza periodo. Kreiĝis, en la formo de la Societo Zamenhof, membrokategorio por mecenatoj, kaj en 1975 la Komitato unuanime akceptis Financan Programon de la Esperanto-Movado. Kiel rekonas Grégoire Maertens en tiu ĉi libro, la literatursciencisto Tonkin ĉi-rilate pruvis, ke li estas samtempe “bona manaĝero”. Prezidanto Tonkin povis rapide silentigi la plej multajn dubantojn, ankaŭ pro sia toleremo kaj sia preteco aŭskulti la argumentojn de aliaj. Estas karakterizaĵo lia, ke li lerte scias disdoni taskojn kaj samtempe ĉiam kuraĝigas al ties plenumo, ne ŝparante helpon kaj konsilon.

Stimulan efikon havis lia senĉese rimarkebla agemo. Tre malofte li permesis al si aludon al la grandaj personaj streĉoj, kiujn postulas la pormovada laboro. Taglibran raporton pri la 67-a UK en Antverpeno (1982) li titolis “Ĉu ni mistraktas niajn gvidantojn?” Kun nur duona ironio li demandis: “Ĉu do okazis en Antverpeno plia pruvo pri la vivkapablo de Esperanto aŭ plia provo de la eltenkapablo de la funkciuloj?” (*Heroldo*, 1982, n-roj 1705 kaj 1706)

En 1980 finiĝis la du unuaj deĵorperiodoj de Tonkin kiel prezidanto. Li mem nomis sian prezidantecon “transira periodo”, sed en tio li malpravis, ĉar efektive ĝi estis mejloŝtona: li repacigis la movadon kaj multe helpis ŝanĝi ĝian etoson. Senpatose li komunikis, ke li ĉesas esti prezidanto por resti kaj pluaktivi en UEA (kiel “simpla” estrarano) kaj la movado. En 1986 li estis persvadita refariĝi prezidanto, tiel ke la agado de UEA pro la centjara jubileo de Esperanto povis profiti de liaj impulsoj kaj aŭtoritato.

Humphrey Tonkin ĉiam montris, ke li bone komprenas la eksteran mondon, precipe kiam temas pri la partneroj de la Esperanto-movado. Dum multaj jaroj, ekde kiam la 19-jarulo vizitis la Varsovia Kongreson en 1959, lia atento koncentriĝis al la rilatoj inter okcidenta kaj orienta Eŭropo. Kiel prezidanto de TEJO kaj de UEA li ofte devis fronti defiojn, kiujn estigas la Malvarma Milito kaj la politik-ideologia divido de la mondo. Necesis zorgi, ke la landaj asocioj de malsamaj blokoj restu kune en la kadro de la neŭtrala UEA. Sian scion

pri la mondo la juna prezidanto larĝigis per multaj vojaĝoj: li vizitis Iranon (antaŭ la islama revolucio), Baraton, Sovetunion (vidu la kontribuojn de Mikaelo Bronŝtejn), Japanion kaj aliajn landojn. En 1978 li iris al Rumanio kun la celo mildigi la negativan sintenon de ties aŭtoritatoj al la Esperanto-movado. Lia dua prezida periodo finiĝis tuj antaŭ la grandaj ŝanĝoj en Eŭropo de 1989/90: tiam ĉesis epoko, en kiu “neŭtraleco ofte egalas al sukcesa klopodo eviti ofendi la du flankojn” (Tonkin en *Esperanto*, 1992, p. 147), ĉu okcidentan aŭ orientan Eŭropon. UEA poste povis turni pli da atento ankaŭ al ekstereŭropaj regionoj. Kiam John Wells transprenis la gvidon en 1989, li povis daŭrigi sur la tonkina vojo, kunhelpante ke UEA forlasu la troan fiksiĝon al Eŭropo kaj pli forte enplektu ankaŭ la kapablojn kaj spertojn de organizaĵoj kaj individuoj en Azio kaj Latina Ameriko.

La eksiĝo en 1989 liberigis por Tonkin rezervojn, kiujn li povis disponigi al aliaj kampoj de Esperanta agado. Jam dum la unua periodo de sia prezidanteco kaj precipe dum la naŭdekaj jaroj li intense zorgis pri la “sciencia akompano” de la Esperanto-movado. Ekzemple, li montris, ke ne simple ekzistas “la monda lingvo-problemo”, sed tuta aro da mondaj lingvaj problemoj, en kies kadron oni devas meti la rolon de Esperanto kaj interpreti ĝin. Sekve, ni parolas ekde de la 80-aj jaroj pri la “Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj” – temas pri CED, kiun Tonkin gvidas ekde 1974 seninterrompe. Grandan atenton li dediĉis kaj daŭre dediĉas al pluevoluigo de la revuo *Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado* (LPLP), kiu en monda skalo fariĝis unu el la ĉefaj lingvopolitikaj fakrevuoj; li ĉefredaktas ĝin kune kun Probal Dasgupta (vidu pri LPLP la kontribuon de Frank Nuessel en tiu ĉi libro). Li krome kunfondis kaj prezidas Esperantic Studies Foundation (ESF), kiu subvencias esplorojn pri internaciaj lingvaj demandoj. Li ankaŭ estas redaktoro de la libroserio *Studies in World Language Problems*. Lia aŭtoritato, akirita en lia profesia vivo, ofte estas grava kaj utila, kiam necesas prezenti Esperanton antaŭ skeptikaj fakuloj.

Por kompletigi la spektron, necesas aldoni multon. Humphrey Tonkin kreis, jam en 1974, la serion de *Esperanto-Dokumentoj*. Li redaktis kaj tradukis en la anglan la librojn de Pierre Janton, *Esperanto: Language, Literature and Community* (1993), kaj de Tivadar Soros, *Maskerado* (2000, tradukitan ankaŭ en la rusan, hungaran, turkan kaj germanan). De tiu ĉi sama libro li redaktis la Esperantan reeldonon (2001). Li esperantigis, plej proksime al sia speciala fako, *Henriko Kvina* (2003) kaj *La Vintra Fabelo* (2006) de Shakespeare. Grandan atenton trovis lia plej lasta libro en Esperanto: *Lingvo kaj popolo: Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado* (2006). Li estas bibliografo por la usona Modern Language Association (MLA) kaj ĉefrespondecas pri ties registrado de novaj eldonaĵoj pri Esperanto kaj interlingvistiko. Tonkin ekde 1983 estas ankaŭ membro de la Akademio de Esperanto.

UEA sciis aprezi la elstaran kontribuon de Humphrey Tonkin. Tial en 1995 li estis invitita iĝi membro en la Honora Patrona Komitato (HPK), kuniganta eminentajn personojn el literaturo, scienco kaj politiko, homojn kiuj simpatias al la celoj de la Esperanto-movado. Tonkin do enviciĝis inter la anoj de HPK, kiuj, laŭ la juĝo de UEA, estas elstaraj en sia fako, sed de kiuj ĝi ne atendas aktivan rolon en la Esperanto-movado. Tio substrekas la rekonon, kiun ĝuas Tonkin kaj en kaj ekster la movado.

Tamen, kiam necese, Humphrey Tonkin denove estis preta doni gravan kontribuon al UEA. Simile kiel en 1986, kiam la eksa prezidanto konsentis resti nura estrarano, li en 2001, jam membro de HPK, denove flankenŝovis hierarkiajn konsiderojn. Li, nome, deklaris sian pretecon ankoraŭfoje eniri la estraron de UEA kiel vicprezidanto. Dum tri jaroj li helpis venki krizon, en kiu la asocio troviĝis pro malakordo inter estraranoj kaj oficistoj de la CO. La krizo estas venkita, sed Tonkin restas je dispono. Li esence kontribuis al la modernigo de la Universalaj Kongresoj kaj malavare donas kritikojn kaj proponojn por adapti UEA al la rapide ŝanĝiĝantaj kondiĉoj de la elektronika epoko sub la influoj de la tutmondiĝo. Kiom aktiva estas lia partopreno, povas bone observi kongresanoj: en preskaŭ ĉiu UK Humphrey

Tonkin tre videble rolas – kiel reĝisoro de la diskutoj pri la kongresa temo, kiel organizanto de la Kleriga Lundo, kiel prezidanto de la komisiono pri la Belartaj Konkursoj, kiel preleganto en IKU kaj, tre populare, kiel gvidanto de aŭkcio. La granda mobiliza kapablo de Tonkin evidentiĝas eble plej okulfrappe per liaj kongresaj paroladoj, sed efektive samgrade per liaj intervenoj en kunsidoj, argumentoj en konversacioj kaj apenaŭ nombreblaj artikoloj.

En festlibroj oni kutime aprezas la vivoverkon de la honorato; kolegoj kaj amikoj prezentas tekstojn, kiuj rilatas al kiel eble plej multaj fakoj de lia intereso. La multflankeco de la jubileulo Humphrey Tonkin ne permesas atingon de tiu celo. Tiu ĉi libro plejparte kunigas tekstojn, kiuj rilatas al la aktivado de Tonkin kiel esperantisto kaj fakulo pri lingvopolitiko. Ĉiuj kontribuoj estas verkitaj en Esperanto. La aŭtoroj estas homoj, kiuj akompanis Tonkin kiel kolegoj kaj kunagantoj aŭ kiuj minimume dividas kun li la interesigon pri difinita fako. Sed ili kune eble donas ideon pri la amplekso de la laboro de Tonkin. Ni kredas, ke pluraj kontribuajtoj traktantaj la lingvon kaj movadon tute akorde kun lia ĉiama zorgo bone instruas pri la interligiteco de teorio kaj praktiko. Aliaj estas pri temoj, kiuj transiras tiun de Esperanto kaj la lingva problemo, sed rilatas al la intereskampoj de Tonkin. Estas reprezentita impresa vario de fakuloj, kiujn unuigas la deziro utiligi Esperanton. Tiel demonstriĝas, kiom eblas atingi per Esperanto en diversaj fakoj. Ni esperas, ke Humphrey Tonkin ĝojos konstati la atingojn en fako, kiu ĉiam estis al li aparte kara: la esperantologio.

Ni invitis ankaŭ “neakademian” kontribuojn. Enestas aro da artikoloj – memoroj, eĉ anekdotoj – kiuj jetas iom da lumo sur la homon Humphrey Tonkin. Ili certe ne sufiĉas por evidenti la plenan konturon de la persono, kiun deziras omaĝi la centoj da kontribuoj de homoj diversmaniere ligitaj al li. Ankoraŭ mankas resuma traktado de lia pli ol kvindekjara sindediĉo al la Esperanto-movado. Sed jam eblas elstarigi, kion ni konsideras liaj ĉefaj karakterizaĵoj. Esencan rolon sendube ludas lia nekredebla labor-energio. Kiam li estis prezidanto, liaj estraraj kolegoj kaj la laborantoj en la CO rapide komencis kutimiĝi al liaj flavaj notkajeraj folioj. Skribante per nelonga grafitkrajono tenata maldekstramane, li plenigis tiujn foliojn per tekstoj, dum li vojaĝis trajne aŭ atendis en flughavenoj. Nun li verŝajne ĉie trenas sian komputilon, sed pli frue la (belan) manskribon de Tonkin devis retajpi la oficistoj en Roterdamo ĉu por la estraro, komitato, iu komisiono aŭ por la revuo *Esperanto*. Iom pri la amplekso kaj vario de la plenumataj laboroj Tonkin malkaŝas en la ĉi-libre publikigita intervjuo, sed al la mira demando de Mark Fettes, kiamaniere li sukcesas fari tion, li reagis elturniĝe.

Humphrey Tonkin demonstris, ke li estas grandioza laboranto, kaj li donis al la movado lecionon kiel gvidi kun aŭtoritato, sed sen distanc-krea stilo. Li evidente ŝatas dialogon kaj egalrangan kunagadon. Ni jam menciis la senprecedencan agon de 1980, kiam li, la antaŭa prezidanto, konsentis pluofici en la estraro kiel nura ano (ekde 1983 kiel vic-prezidanto). Tiu decido substrekas, kiom Tonkin, kies kongresaj paroladoj ofte komenciĝis per “Karaj gekolegoj”, vere sentis sin ligita al la principo de kolegeco. Lia kapablo ne nur labor(eg)l, sed ankaŭ laborigi aliajn, en kolektivo, aŭ almenaŭ persiste instigi al laboro, eĉ se ofte sen tuja sukceso, konsistigas tion, kion ni elektis kiel titolon por tiu ĉi libro: “La arto labori kune”.

La redaktoroj komencis sian laboron en somero 2008. Ni dissendis invitleterojn al granda nombro da personoj, kiujn ni laŭ diversaj kriterioj juĝis esti proksimaj al Humphrey Tonkin. Feliĉe ni povis parte bazi nin sur pli fruaj preparlaboroj faritaj de Mark Fettes. La eĥo je nia invito estis tre bona. Kelkaj kun bedaŭro malakceptis, ĉefe pro aliaj urĝaj devoj, sed ili uzis la okazon por certigi la redaktorojn pri sia ŝato de la honorota homo. Verŝajne ni ne sukcesis inviti ĉiujn amikojn kaj kolegojn de Humphrey Tonkin, kiuj meritis kaj pretus partopreni en la festlibro. Ni bedaŭras tion, sed ankaŭ la amplekso de la libro metas difinitajn limojn.

Ni petis ĉiujn aŭtorojn provizi siajn tekstojn per la kutimaj indikoj pri uzitaj fontoj kaj per fina bibliografio. Ni sendis al ili “gvidliniojn”, per kiuj ni volis orienti la kontribuantojn, sed ankaŭ faciligi nian propran laboron. Ni klopodis redakti kiom eble unuece, sed konscias, ke ne eblis plene atingi tiun celon, ĉar aŭtoroj kaj redaktoroj havas siajn preferojn kaj okaze insistas pri ili. Ni foje ete, foje forte redaktis la ricevitajn tekstojn, pri kies fina formo tamen decidis la respektiva aŭtoro. Laŭ nia peto la aŭtoroj kontrolis la interretajn fontojn lastfoje en oktobro 2009.

La redaktitajn tekstojn skrupule kontrolis Robert Moerbeek, kaj pri la enpaĝigo kaj prespretigo kompetente zorgis Roy McCoy. Al ili ambaŭ ni esprimas dankon. Ni dankas ankaŭ al Osmo Buller, kiu dekomence kuraĝigis la redaktorojn kaj daŭre subtenis ilian laboron per siaj konsiloj.

La kontribuajoj al tiu ĉi libro estas ordigitaj laŭ naŭ temaroj. Kelkaj legantoj eble fojfoje preferus, ke difinita artikolo apartenu al alia temo-kategorio. Sed supozeble ĉiuj estos kontentaj vidi, ke en pluraj kontribuajoj la redaktoroj piednote montras aŭ resendas al la trakto de la sama aŭ de simila temo en alia artikolo. Por ŝpari spacon fotoj estas metitaj ne sur apartaj paĝoj, sed dise tra la libro. Ili kutime ne rekte rilatas al la eseoj, ĉe kies finoj ili aperas.

Ni devis rezigni pri *tabula gratulatoria*, ĉar tia aparta listo de gratulantoj simple iĝus tro ampleksa. Ĝin anstataŭu la vortoj de Ludoviko K. Zaleski-Zamenhof presitaj sur tiu ĉi paĝo. Al ili sendube aliĝas la aŭtoroj.

Ni transdonas la libron al la festanta Humphrey Tonkin – kun danko, sed ankaŭ kun la konscio, ke tiu ĉi volumo ne sufiĉas por esprimi nian dankon al li pro ĉio, kion li donis al nia lingvo, movado kaj komunumo.

Berlin/Bonn, 2.12.2009

DETLEV BLANKE
ULRICH LINS

Omaĝon al vi, Humphrey, kara amiko mia: sepdekjarulo daŭre kaj senĉese juna, same mense kiel korpe. Mi diras amiko, ĉar mi fieras konsideri min la amiko de elstara eminentulo de la Esperanto-movado. Ĉu Prezidanto, ĉu Prezidinto de nia Universala Asocio, vi ĉiam restadas senkompara aŭtoritatulo, same pri organizado, pri gvidado, kiel pri la lingvo mem, estante renoma sciencisto, universitata profesoro, verkisto kaj tradukisto.

En Pollando, la lando de mia infaneco, oni kutimas, festante naskiĝ-datrevenon, kanti “*sto lat, sto lat*”. Tiuj kantvortoj signifas bondeziron por centjara vivo. Vivu do almenaŭ cent jarojn, Humphrey kara, kaj restu eterne vivanta en la koroj de generacioj estontaj!

LUDOVIKO K. ZALESKI-ZAMENHOF